Pola Esperantisto
Esperantysta Polski

XXXII JARO	NRO 8—9	Aŭgusto — Septembro 1938.

ELDONANTO — WYDAWCA
POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO

REDAKTANTOJ — REDAKTORZY
PROF. DR ODON BUJWID — MGR TADEUSZ HODAKOWSKI

Aperas la 20-an de ĉiu monato. Redakcian materialon oni petas sendi ĝis la 10-a de ĉiu monato. La redakcio estas rajtigita laŭ bezono ŝanĝi la tekston de manuskriptoj.

VIII POLLANDA KONGRESO DE ESPERANTO EN KRAKÓW.

(fino)

Ĝia sidejo estu en Ĝenevo, la centro de la internaciaj movadoj, kie la tuta agado por Esperanto en lernejoj estis siatempe iniciatita de Dro Edmond Privat.

Post la referato okazis vigla diskuto. Ĉiuj parolintoj kondamnis la organizan duecon kaj esprimis sian indignon precipe pro maljustaĵoj kontraŭ la organizintoj de la Jubilea. Oni esprimis ankaŭ la deziron, ke la Londona kaj la sekvontaj kongresoj estu ree „Universalaj", sed ne kongresoj nur de unu el la du nunaj centraj organizaĵoj Esperantistaj.

Unu el la parolintoj I. Lejzerowicz sub la impreso de la nunaj malfavoraj okazaĵoj en la Esperanta movado, kiel organizaj malpacoj, malpermeso de Esp. organizaĵoj en Germanujo kaj Aŭstrujo ktp., estis tre pesimista rilate la estontecon de nia movado.

Al li respondas prof. dro Bujwid, kiu diras, ke malgraŭ ĉio ni devas esti optimistoj kaj ni ne povas perdi la esperon pri la venko de niaj idealoj, kiu ja estas certa. Oni devas havi ĉiam junan koron, kiel mi ĝin havas. Kredu al mi finas prof. Bujvid, turnante sin al Lejzerowicz — mi pli longe vivis ol vi kaj mi scias, ke oni devas esti optimisto. (Aplaŭdegoj).

Post fino de la diskutado estis akceptitaj jenaj rezolucioj, prezentitaj de kongresanoj:

1) La VIII Tutpollanda Kongreso de Esperanto en Kraków rekomendas al PED elpaŝadi sur juĝeja vojo kontraŭ la gazetaraj atakoj, multiĝintaj en lasta tempo kontraŭ Esperanto en Polujo.

2) La VIII Tutpollanda Kongreso de Esperanto en Kraków, priparolinte la sekvojn de la Jubilea Kongreso de Esperanto en 1937 por la tutmonda kaj pola Esperanto-movadoj, konstatas: ke la LKK de la Jubilea faris sian devon por la Esperanto-afero bone kaj honeste malgraŭ la ĉiaspecaj malhelpoj kaj nejustaj atakoj, iniciatitaj kun helpo de kelkaj samideanoj

3) La VIII Pollanda Kongreso de Esperanto alvokos la centrajn organizaĵojn Esperantistajn, ke ili finu la organizan malpacon.

4) La VIII Pollanda Kongreso de Esperanto, aŭdinte la raporton pri la laboroj de la Komisiono por Internaciaj Problemoj ĉe LKK de la Jubilea, opinias, ke necesas elekto de speciala instanco, okupiĝonta pri la plua efektivigo de la Interŝtata Esperanto-Akordo. Tiu instanco konsistu el reprezentantoj de la asocioj IEL, UEA kaj TAGE proporcie al la nombro de iliaj membroj kun sidejo en Ĝenevo konforme al la propono de K. I. P.

5) La VIII Tutpollanda Kongreso de Esperanto, aŭskultinte la raporton pri radioagado, iniciatita de Varsovia Esperantista Societo, komisias al tiu Societo plue gvidi la agadon, alvokas ĉiujn societojn kaj samideanojn apogi ĝin kaj petas Pollandan Esp. Delegitaron protekti la tiucelan agadon.

Fine estis ankaŭ unuanime prezentita jena rezolucio, prezentita kune de ambaŭ ĉefdelegitoj Ŝapiro kaj Chmieliński, kio kaŭzis grandan sensacion en la salono:

6) La VIII Pollanda Kongreso de Esperanto alvokas PED, ke ĝi aperigu en la pollanda gazetaro refuton de la senbazaj atakoj kontraŭ la Esperanto-movado kaj la Jubilea Kongreso. La refuto estu bazita sur la rezultoj de oficialaj juĝejaj esploroj kaj sur la decidoj de oficialaj ŝtataj instancoj, konstatantaj senbazecon de la akuzoj.

Tiu komuna rezolucio de la reprezentantoj por Polujo de IEL kaj UEA faris bonan impreson. Ankaŭ faris bonan impreson, ke inĝ. Chmieliński post la referaĵo de red. Ŝapiro deklaris publike, ke li estas preta montri al PED resp. speciale elektota komisiono siajn aktarojn, el kiu estas klare videbla, ke li kontraŭas la sintenon de la oficiala kongresraportinto de „Heroldo“ kaj ke unu nigra ŝafo ne povas makuli la tutan anaron.

Aro da rezolucioj, enhavantaj aludojn kaj kritikojn kontraŭ IEL kaj kontraŭ la aranĝo de la Kongreso en Londono nur de IEL, ne estis voĉdonita de la prezidanto Dro Leon Rosenstock malgraŭ la videblaj simpatioj por unueco en la salono. La prezidanto opiniis, ke ne estas eble ataki IEL kaj ke oni devas kredi al ĝi, ke tamen la Kongreso estos Universala. Samtempe li klarigis, ke PED oficiale jam montris sian sintenon en la afero: ĝi aliĝis al IEL, sed ankaŭ deklaris, ke ĝi subtenos ankaŭ UEA kaj rekomendis al izoluloj aliĝon al ĝi.

Ĝenerala Kunveno de PED.

Posttagmeze okazis la ĝenerala kunveno de Pollanda Esp. Delegitaro. Ĝin partoprenis nur la rajtigitaj Delegitoj, kies rajtigoj estis severe kontrolataj. La cetera publiko rajtis nur aŭskulti, sed ne partopreni la diskutadon aŭ voĉdonadon.

La Konferenco aprobis la agad- kaj kasraportojn de PED, prezentitajn de s-roj Kutscher kaj Alfus kaj decidis alvoki ĉiujn grupojn kaj izolajn Esperantistojn, ke ili monoferu por la „5.000-fondo“, kiu ebligos al PED pli grandan propagandan kaj organizan laboron.

En la ĉefkonsilantaron de PED estis elektitaj: s-ino M. Szczepańska (Kraków), s-ro I. Wiesenberger (Kraków), inĝ. dro Emiljan Loth (Łódź), kaj kpt. Silhan (Lwów); en Revizian Komisionon: inĝ
Zagajewska kaj s-ro So
ków, anstataŭantoj: f-i
ków) kaj s-ro Toczyski

Distra

La kongresa program
unuan tagon por la ser
laborado kaj la duan tagon nur por distraĵoj. La distraĵoj okazis en la ku oj de la ĝenerala programo de t. n. „K vaj Tagoj“ kaj estis fervore partoprenataj de la kongresanoj. Okazis ankaŭ gvidadoj tra la urbo kaj ĝiaj historiaj vidindaĵoj. Precipe kompleze gvidis la kongresanojn samideano Tydor.

Tre gaje pasigis la kongresanoj la tempon en la Luna-Parko, nomata en Krakovo „La gaja urbeto“. Eĉ la severa kongresprezidinta Napoleono amuzis sin tie bonege kun siaj IEL-kontraŭuloj kaj — precipe kun siaj IEL-kontraŭulinoj. Kontraŭ la ulinoj li tie ial kaj iel ne plu kuraĝis elpaŝi...

Ĉiam antaŭen!

La Kongreso jam pasis. Kiel ni diris, ĝi ne estis multnombra. Tion kaŭzis ne nur la nekutima kongresdato, sed ankaŭ la malĝojigaj okazintaĵoj pro la Jubilea kaj la organiza disputo Londono-Ĝenevo. Tiuj b daŭrindaj faktoj fortimigis multajn de movado, cetere ne nur en Polujo.

La Kongreso tamen tre serioze lab kaj ĝi montris, ke malgraŭ la momen malvenkoj, malgraŭ la eksteraj malami kaj internaj malprudentuloj nia movado men vivos kaj kreskos kaj ke al ni apar nas la venko.

Pollanda Kongreso montris, ke polaj Esp rantistoj restis fidelaj kaj laboros pluen ma graŭ ĉio kaj eĉ, se necese, malgraŭ ĉiuj, konservante laŭ la saĝa konsilo de prof. Bujvid la JUNKORECON kaj ESPERON.

Al la mondo Esperantista la Pollanda Kongreso direktis per siaj rezolucioj UNU alvokon:

— P r u d e n t o n!

Mal-Napoleono.

Dr A. Czubryński bone komprenis la valoron de la Eklezio al Esperanto, klopodante ĝin gajni por la Interŝtata Esperanto-Akordo.

Do, ĉiu katolika esperantisto en la nomo de bono de Esperanto unuiĝu, por ke ni estu vidataj, ke ni volas utiligi nian potencan ilon: mondlingvon, por disvastigo de la Regno de Dio!

Do, senhezite fariĝu membro al la Pol. K. L. E. Jara membrokotizo kune kun la abono de la bela riĉenhava oficiala organo de I K U E estas 6·40 zł. Krome ĉiu Pol. K. L. E.-ano ricevas belan Jarlibron. Ĉiu novaliĝonto ricevos la Jarlibron ankoraŭ por la nuna jaro.

Adresu: Sekretario de Pol. K. L. E. S-ro [illegible]k Świerklany, pow. Rybnik, G. Śląsk P. K. O. 303-779 Katowice.

R. Chromik.

—■—

S-TA ANDREO BOBOLA KAJ LIA PROFETAĴO.

El la kanoniza dokumentaro de s-ta Andreo Bobola, enmanigita al la partoprenintoj de la papa duonsekreta konsistorio, kiu okazis la 31-an de marto, estas menciinda la gravega raporto de Jezuito pastro Filkierzamb pri la antaŭdiro kaj vizio, okazinta al la Dominikano, patro Korzeniewski, en la jaro 1819.

Jen resumo de la raporto:

„En la jaro 1819 estis en Vilno patro Korzeniewski, dominikano, pia pastro kaj fama predikisto. Li estis senĉesa batalanto kontraŭ la skismaj eraroj en la instruaj verkoj.

... Iun vesperon patro Korzeniewski post la vesperaj preĝoj, fermis la fenestron, intencante fari promenon; sed tuj, kiam li turnis sin, li ekvidis sur la mezo de la ĉelo figuron en la jezuita vesto.

La figuro ekparolis: „Patro Korzeniewski, mi estas Andreo Bobola. Malfermu le fenestron, ĉar vi ekvidos mirindaĵojn".

La Dominikano obeis lin. Je sia miro li ne ekvidis malgrandan monaĥejan ĝardenon, sed nemezureblan spacon, etendiĝantan ĝis fino de la horizonto.

La ebenaĵo estis kovrita per batalionoj de Rusoj, Turkoj, Angloj, Francoj, Germanoj kaj aliaj popoloj. Ili ĉiuj batalis unu kontraŭ la alia. La monaĥo ne komprenis, kion signifas tio; helpis lin la sanktulo.

Li diris — „Alvenos tia milito, kaj post la repaciĝo Polujo estos libera, kaj mi estos rekonita ĝia ĉefa patrono".

Ĝojigite per la promeso patro Korzeniewski vokis:

„Ho mia Sanktulo, ĉu mi povas esti certa, ke tiu vido kaj la elĉielvizito kaj la antaŭdiro ne estas imagiluzio, aŭ nura sonĝo?"

„Konfirmu tion mia mano", respondis la respektinda Andreo, „tio, kion vi vidas, estas vera kaj efektiva. Ĉio plenumiĝos laŭ mia diro. Ripozu nun. Por ke vi havu signon de mia apero, mian mansignon mi restigas sur via tablo".

Tion dirante, li surmetis la manon sur la tablon kaj malaperis.

La vidon kaj la antaŭdiron publikigis pastro Filkierzamb en la jaro 1855 en privata letero, aperigita en la franca gazeto „l'Union Franchecontoise", kaj kelkajn monatojn poste ĝi estis ripetita en pola gazeto „Przegląd Poznański" (1855) T. XX.

Ryszard Chromik, Polujo.

(el „Espero Katolika").

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO.

ĈU ONI POVAS EFIKE PROPAGANDI ESPERANTON PER KINO?

La respondo al tia demando ne estas duba: nepre jes. Sed ne sufiĉas, ke propaganda filmo estu efika. Gravas ankaŭ, ke ĝi estu praktike kaj ofte uzebla. Tio okazas se: ĝi estas malmultekosta, se ĝia tekniko estas tia, ke oni povu uzi ĝin ĉie kaj sen aparatoj eksterordinaraj.

Pri la efikeco, tiu filmo devas: esti sen titoloj kaj sen paroloj, sed komprenebla per a agado mem, per ĝiaj bildoj, kiuj estas fakte la plej internacia lingvo, montri la esperantan temon je diversaj aspektoj: praktika, lingva, gastema, pacisma. Fine, ĝi devas ne tedi la rigardanton, sed distri, eĉ amuzi lin, kaj lin konduki iom post iom al pli seriozaj demonstracioj.

Povas esti interese konstati kiel oni zorgis pri tiuj precizaj konsideroj en provo jam konata, tiu filmo „Antaŭen", kiun faris francaj Esperantistoj — okaze de la 50-a jarfesto de Esperanto. Novaj detaloj venas hodiaŭ kaj klarigas, kiel la aŭtoroj atentis pri la ĉi-supraj punktoj.

La financan kaj teknikan punktojn solvis senpene la elekto de la filma formato 16 milimetra. Efektive, unu horo da projekcio 16 milimetra kostas de ses ĝis dekoble malpli multe ol samlonga projekcio el granda formato. Plie, la 16 m/ma filmo estas tutmonde uzebla eĉ en la plej malgrandaj vilaĝoj, ĉar ĝiaj projekciaparatoj estas ĉie aĉeteblaj aŭ lueblaj je malalta prezo. Ankaŭ ĝia eta pezo gravas, por la facilo de la sendoj aŭ de la portadoj.

Aliflanke, „Antaŭen“ estas realigita laŭ la stillinio de la moderna kino, el ritmo, el situacioj, el vivo kaj movo, tiel ke klarigaj titoloj aspektus tute superfluaj. Cetere, ili estis nepre evitotaj pro ĉiuj tradukaj malfacilaĵoj, kiujn ili kreus.

La ĉefa karaktero de „Antaŭen“ estas ĝia komenca aspekto ne severa, kiu venigas la publikon, ŝtupon post ŝtupo, al la esperanta temo. Dum dudek minutoj, ĝi rakontas laŭ komika kaj plej movema maniero la malfeliĉojn de iu fremdulo, kiu venas en Paris, kaj povas paroli kun neniu. Pli kaj pli gravaj miskomprenoj okazas al li, aventuroj (en fame konataj kvartaloj de Paris) ĝis kiam nia kompatindulo perdas ĉion: vestojn, pakaĵojn, eĉ... esperon. Tiam, li renkontas Esperantiston. Tiu ĉi komprenas lian situacion; li ekinstruas al li Esperanton, per rekta metodo, borde de la rivero Seine. Tie, lokiĝas perekrana lingva demonstracio, kaj poste la filmo pliserioziĝas. La du kunuloj renkontas aliajn samideanojn; ankaŭ tiuj akompanas la eksterlandanon, kaj tiam okazas rapida vizito de la esperantistaj Paris-aj medioj. De loko al loko, la amikaro pligrandiĝas, ĝis okazigi esperantistan manifestadon el pluraj centoj da personoj meze de kiuj oni vidas multajn francajn famulojn.

Kaj venas la pacisma parto, verkita laŭ simbola stilo. Kiam la manifestantoj kantas hore „LA ESPERO“-n, aperas bildoj, komence konfuzaj, kaj iom post iom pli netaj, kiuj montras militistajn demonstraciojn. Virino aplaŭdas; sed ŝia vizaĝo estas kaŝata de okulŝtopilo el ŝtofo. Tiam aperas Esperanto, simbole reprezentata per brako kun verdstela ringo. Ĝi eltiras la okulŝtofon por ke la virino vidu, malantaŭ la brilaj soldatoj, naŭzajn, teruregajn militajn scenojn. Poste, Esperanto kondukas ŝin, poezie promeni en la alia flanko de la vivo, sur la kamparo paca, fruktodona, prizorgata de homoj, kiuj laboras, kiuj „konstruas“, kiuj ame daŭrigas la vivon, ĉiujn vivojn... La lastaj bildoj estas resumo de la monda ĥaoso, kaj aludo al la neceso de tiu ordiga kaj amiga solvo, kiu estas nia lingvo.

Tiu ĉio estis, por niaj francaj samideanoj, ega peno, ĉefe financa. Tial ili meritas ke ilia provo, ne ĉefe estu laŭdata, **sed ke ĝi UTILU.**

Tiucele, por ĉiaj aliaj klarigoj, aŭ por eventuala uzo de la filmo „ANTAŬEN“, sin turni al la „SOCIETO FRANCA DE PROPAGANDO POR ESPERANTO“ 34, rue de Chabrol, PARIS-10. (J. L. M.)

—▬—

Unua Internacia Filatelia Ekspozicio en Rio-de-Janeiro.

La Unua Internacia Filatelia Ekspozicio, okazonta en Brazilo sub la nomo BRAPEX, havos lokon en Rio-de-Janeiro, de la 2a ĝis la 30-a de oktobro nunjara. La ekspozicio estas organizota de la Brazila Filatelia Klubo, kiu komisiis tiun laboron kaj ĝian realigon al Organiza Komisiono. Ĝi estas oficialigita kaj subvenciita de la brazila registaro kaj efektiviĝos sub la honora prezido de la Respublika Prezidanto kaj la patroneco de la Ministroj de Trafiko kaj de Financo kaj de «Internacia Filatelia Federacio» kaj «Federacio de la Filateliaj Societoj».

La Organiza Komisiono baldaŭ eldonos bele ilustritan Bultenon enhavantan la Regularon de la Ekspozicio kaj la Klasifikon de la elmontrotaj objektoj. Ĝi estos redaktata en la ĉefaj nacilingvoj **kaj en Esperanto.**

Bonvolu tuj peti la Bultenon de: Comissao Organisadora da BRAPEX, Av. Rio Branco, 117, 2° and., Rio-de-Janeiro, Brazilo.

Ostatnia obniżka ceny!

Naukowe Koło Esperanckie obniżyło cenę na podręcznik szkolny p. t. „LEKCJE JĘZYKA ŚWIATOWEGO ESPERANTO“ w opracowaniu prof. SYGNARSKIEGO (wyd. II. aprobowane powtórnie przez Ministerstwo WR i OP) na 1·— zł. Wpłaty i zamówienia kierować należy pod adresem: N. K. E. Bydgoszcz, pl. Wolności 9 (konto P. K. O. Nr. 210.647) lub **administracji Pola Esperantisto (Kraków, ul. Lubicz 34) konto P. K. O. Nr. 406.660. Przesyłka 15 gr.**

ABONO: jare zł 8·—, duonjare zł 4·—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł 6·—. Eksterlande 7 sv. fr. Aparta numero zł 0·70, duobla zł 1·40.
ANONCOJ: 1/2 paĝo zł 30·—, 1/4 paĝo zł 15·—, 1/8 paĝo zł 10·—. Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł 1·—.
PRENUMERATA: rocznie zł 8·—, półrocznie zł 4·—. Dla Towarzystw i grup esperanckich rocznie zł 6·—. Zagranicą: 7 fr. szw. Numer pojedynczy zł 0·70, podwójny zł 1·40.
OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł 30·—, 1/4 strony zł 15·—, 1/8 strony zł 10·—. Korespondencja: małe ogłoszenia z 10 słów (prócz adresu) zł 1·—.
Przekaz rozrachunkowy: kartoteka Nr 29, Kraków 2. — Konto P. K. O. Nr 406.660.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34.

Wykonano w Drukarni Miejsk. Muz. Przemysłowego w Krakowie. Redaktor odpowiedzialny: Dr Leon Rosenstock.